

Joh.. H: Petersen,

## Lingvo internacia

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ho kara lingvo ci!  
Laŭdas vin laŭte ni  
Per vort' kaj kant'.  
Interkomprenon ci  
Semas ja inter ni,  
Ponton konstruas ci  
De land' al land'.

Ho kara lingvo ci,  
Estos fidelaj ni,  
kiel fratar'.  
Vi ja kunligas nin,  
Kore ni amas cin.  
Pacon instruu ci  
Al la homar'!

Ho kara lingvo ci,  
Donas promeson ni  
Kun sankta ĵur'.  
La vojon iru ni,  
Kiun elmontras ĝi  
En korojn metu ci  
Senton de pur'.

...

Ho kara lingvo, ja  
Regu eterne la  
Pac' en la mond'!  
Kredu ni ĉiuj ĝin:  
Venkos ni je la fin'.  
Donu esperon ci  
Al frata rond'!

*Traduko de la Esperanta poemo "Lingvo internaci"' de Joh.. H: Petersen en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2008-11-17.*

*MR-472-1 / Arg-813-1631 (2013-02-03 10:37:59)*

*Mi, Manfred Retzlaff, aliverkis la tekston en 2005-11-15; ĉar mi pensis, ke la adjektivan finaĵon "-a" en la vorto "internacia" oni ne rajtas elizii.*